

Nia amiko

Pedro A. Zurita



Nia retpaĝo <http://uica.info/esperanto/> ebligas ke homoj tre distaj de ni konu la ekziston kaj agadon de Astura Esperanto-Asocio. Tial, fojfoje agrabla renkontiĝo okazas.

Antaŭ kelkaj monatoj, S-ro Zurita skribis al mi, ke li opinias tre interesaj kelkajn artikolojn de S-ro Castaño kiujn li trovis en nia retpaĝaro. S-ro Zurita estas esperantisto; li partoprenas en la retpoŝta listo de Hispana Esperanto-Federacio, HEF-anaro. Li loĝas de antaŭ multaj jaroj en Madrido, sed li naskiĝis en Asturio. En tiu unua komunikaĵo, ne ĉio estis laŭdoj; ankaŭ plendis li ĉar la enretigo de nia revuo "Heleco" ne estas taŭga (ĉi-rilate legu sube la teĥnikan epigrafon). Kun la promeso plibonigi tiun aferon, ni daŭrigis interŝanĝi retleterojn.

Ĉiujare, S-ro Zurita venas al Oviedo por pasigi Kristnaskon ĉe lia fratino. Tia vizito estas bona okazo ke ni renkontiĝu, do ni rendevuis por manĝi la dudek-sesan de decembro. Kiam mi renkontis lin, lin akompanis lia bofrato, kiu tuj lasis nin solaj. Pedro (permesu al mi ke de nun mi nomos lin pli familiare) proponis ĉinan restoracion, kion mi akceptis sen hezito; de antaŭ longe mi ne gustumis ĉinajn kuiradojn (ĉar mia edzino kaj geamikoj malŝatas ilin). Pedro eniris la restoracion salutante: "nihao!". Li klarigis: "mi komencis lerni la ĉinan". Pedro jam parolas flue plurajn lingvojn. Sed tio ne sufiĉas al lia lernema spirito, kaj li lernas nun ankaŭ la asturan.

Dum la manĝado, Pedro montriĝis kiel afabla kaj alirebla homo. Kiam poste mi legis artikolon lian kvazaŭ vivresuma, mi miris ĝuste pro tia afableco en homo kiu pasigis multajn jarojn en postenoj de internacia respondeco. (Vi povas legi la artikolon en la retpaĝo <http://sotirof.dir.bg/g-pedr1i.html>) Ni parolis pri niaj laboroj kaj aferoj de komuna intereso (lingvoj, komputiloj). Pedro rakontis pri la festeno de la Zamenhofa tago en Madrido, kun gravaj kleruloj el la hispana E-movado, kaj mi respondis rakontante pri nia celebrazo en Candás (vidu raporton de en tiu ĉi informilo1).

Tiel ni pasigis du tre agrablajn horojn. Post adiaŭi niajn ĉinajn gastigantojn refoje en ilia propra lingvo, Pedro prezentis al mi sian fratinton. Nur dum kelkaj minutoj ni povis konatiĝi ĉar Pedro devis trafi aviadilon al Madrido post malmulte da tempo. Nepre mi diru ke renkonti Pedron estis tre riĉiga sperto, kaj mi kore esperas ke baldaŭ ni rekunsidos.

TEĤNIKA EPIGRAFO: Ŝanĝoj teĥnikaj por ellaborado de Heleco.

AEA publikigas revuon papere sed, pro ekonomiaj motivoj, de nun ĝi aperos tiamaniere nur por la asocioj; ceteraj homoj povos elŝuti " el la retpaĝo elektronikan version laŭ la tre normala kaj publika formato PDF. La problemo estas, ke ties enhavo konsistas tute el bildoj, t.e. Plejmultaj homoj vidas tion kiel foton de la paĝo, do ili kapablas legi la tekstojn kaj ĝui la bildojn. Sed ne ĉiuj homoj vidas tiel. Ofte ni forgesas ke estas ankaŭ blinduloj. S-ro Zurita apartenas al tiu malplimulto ekde kiam li aĝis ĉirkaŭ naŭ jarojn.

Li klarigis al mi la manierojn kiel li povas legi per komputilo:

- Unue, li havas aparaton konsistantan el linio de klavoj kun reliefaj signoj Brajlaj; per ĝi li povas legi la enhavon de teksta terminalimitaĵo (t.e., speciala aparato por blinduloj kiu prezentas la tekstaj signoj (literoj, numeroj k.s.).

- Due, li havas programon JAWS kiu legas laŭte tekstojn en iu ajn fenestro de lia Vindaĵo ekrano, sed kondiĉe ke ĝi konsistu el skaleblaj kaj ne bito-mapaj literoj.

Niaj dosieroj PDF de "Heleco" estas legeblaj per neniu el tiuj manieroj. Do s-ro Zurita prave plendis. Por la lasta numero, ia solvo estis sendi al li kelkajn artikolojn el kiuj ni trovis la originajn dosierojn. Por estontaj numeroj, ni ŝanĝos la teĥnikon fari la finajn PDF: ni generos "Heleco"-n per la eldon-programo Scribus (<http://www.scribus.net>) kiun, aliflanke, oni parte esperantigis.

Carlos E. Carleos Artime